Дмитрий Николаевич Садовников,

Volga, Volga (Stenjka Rasin)

tradukita de Kristian Langgaard

De malantaŭ la insulo
sur la ondoj de l' river'
iras ŝipoj multkoloraj,
flirtas flagoj en aer'.

Sur l' antaŭa Stenjka Razin;
festas la edziĝon li
al princino el Persujo
en varmega amebri'.

Sed la viroj murmuregas:
"Tute li forgesis nin.
Nin virino anstataŭos.
Li fariĝis mem virin"'

Tiun mokon aŭdas Stenjka,
la terura ataman'.
Ĉirkaŭbrakas la persinon
li per sia forta man'.

Li la nigrajn brovojn sulkas
Fulmotondro estas li.
En okuloj liaj estas
nun videbla sangebri'.

. . .

“Nu fordonu, mi trezoron
la plej belan de l’ amant’!”
sonas lia tondrovoĉo
trans la ondojn al la strand’.

La princino mortpaliĝas
(Timo estas en l’ okul’)
kaj silente aŭdas jenajn
vortojn de la terurul’:

“Volga, Volga, patrineto!
Volga, via estu ŝi!
Ne antaŭe Don-kozakoj
donis tian-ĉi al vi!

Inter liberuloj estu
- Volga, Volga, patrinet’
nek malpaco nek batalo!
Tial - jen la virinet’!”

Kaj li ĵetas la persinon
(la plej karan sur la ter’)
en la bluan profundaĵon,
kaj ŝin glutas la river’.

“Nun agordu balalajkojn!
Ludi, danci volas ni!
Estu gajaj, kamaradoj
je la belmemor’ pri ŝi!”

. . .

Jen dum kanto, danco, ludo
sur la ondoj de l' river'
iras ŝipoj multkoloraj,
flirtas flagoj en aer'.

Traduko de la Rusa poemo "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de Дмитрий Николаевич Садовников *(Dmitrij Nikolajeviĉ Sadownikow, ∗1847 – †1883) en Esperanton de* Kristian Langgaard *(∗1894 – †1957).*

Arg-478-1036 (2010-03-08 21:19:37)

Mi, Manfred Retzlaff, prenis tiun ĉi esperantigon el la reta kolekto "http://www.esperantonia.dk". kiun kunmetis s-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK4640 Fakse, Danio, `lars.kromann@mail.dk`*). Vidu la retejon* `http://www.esperantonia.dk/volga.htm`*. Kristian Langgaard estis dana Esperantista verkisto kaj Esperanto-instruisto. Vidu ekzemple:* `http://www.esperantonia.dk/lingvaj.htm`*. Pri lia vivo kaj verko vidu ankaŭ la artikolon* `http://www.esperantonia.dk/bio-langgaard.htm`*.*